

# FLANDRA



# KATOLIKO

MAANDSCHRIFT VAN HET  
KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND

## POR DISTRA HORO

la plej taŭgaj libroj en Esperanto estas

### la "EPOKO"-libroj

La libroj enhavas interesajn, malenuigajn romanojn.  
Ĉiu libro enhavas 192 paĝojn, laŭ formato 18 x 11.5 cm.  
Preso klara — bindo kartona — papero bonkvalita

- |  |   |
|--|---|
| 1. MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO. Agatha Christie.<br>El la angla originalo tradukis « Etulo ». | Badash.   |
| 2. LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO. F. Molnar.<br>El la hungara originalo tradukis L. Spierer.       | 4. LA TEMPO-MASINO. H. G. Wells.<br>El la angla originalo tradukis E. W. Amos.                  |
| 3. LA PRINCO KAJ BETTY. P. G. Wodehouse.<br>El la angla originalo tradukis G.                  | 5. PRINCINO DE MARSO. Edgar Rice Burroughs.<br>El la usona originalo tradukis K. R. C. Sturmer. |
|  | 6. COLOMBA. Prosper Mérimée.<br>El la franca originalo tradukis Prof. J. Beau.                  |

Prezo de ĉiu libro Fr. 12.—, afrankite.  
La ses libroj kune por Fr. 65.—, afrankite.

Eldonitaj de THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LTD., ANGLUJO.

Mendu ĉe F.U.K.E., 14, Egied Segerslaan, Wilrijk.

.. Rookt ..  
**JAMAYCA**  
DE FYNSTE DER SIGAREN

Rijke keus in cigarillos  
Sigarenfabrieken JAMAYCA, Arendonk  
(oni korespondas en Esperanto)



ESPERANTISTOJ!  
Ĉiam konsultu por viaj vojaĝoj  
«Ultra Montes»

La plej belaj vojaĝoj je la  
plej avantaĝaj kondiĉoj.

Ultra Montes, a. s. Antverpeno: 46  
Korte Nieuwstr. Tel. 276.51 & 303.50.  
Bruselo: Nieuwstr. 167. Tel. 17.53.44

## FLANDRA UNUIĜO

DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ F. U. K. E.  
Kath. Vlaamsch Esperanto Verbond K. V. E. V.

Voorzitter: Lic. Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst. Ondervoorzitter: Dr Marcel Naster, Naamsche straat 113, Leuven. Proost: E. H. A. Beckers, Professor, Normalschool, Mechelen a. Maas. Secretaris: J. Van Deun, Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout. Kassier: K. V. E. V. Aalst, P-konto 412.354.

### PROVINCAJ KAJ LOKAJ DELEGITOJ:

#### Antwerpen

ANTWERPEN  
BONHEIDEN  
BORNEM  
EDEGEM  
EKEREN  
GEEL  
HOBOKEN  
MERKSEM  
MOL  
Ste MARIABURG  
WILRIJK

E. Paesmans, Koepoortstraat, 64, P-konto 4145.89  
Kapitano P. Vangeel  
A. De Ridder, Boschkant, 1  
R. Torfs, Verbindingstraat, 9  
Joz. Thijssens, Geesten, 72  
M. Gordon, kleermaker, Statiestraat, 3  
J. De Groot, onderwijzer, Caronstraat, 31  
H. Versavel, Bredabaan, 785  
F-ino M. Bergmans, Markt, 19  
Joz. Cammaert, Van de Weygaardlei, 12, P-konto 4274.93  
D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14

#### Brabant

GRIMBERGEN  
LEUVEN

E. H. Canisius van Hoogstraten, o. praem., abdlj  
Petro De Fraye, Kapucienenvoer, 75, P-konto 4427.19

#### Limburg

BILZEN  
BREE  
HASSELT  
TONGEREN

K. Dubois, Brugstraat 26  
H. Beelen, professor, Cpllege  
A. Tournel, Guido Gezellestraat, 5  
Jos Smets-Box, Kielenstraat 74

#### Oost-Vlaanderen

GEERAARDSBERGEN  
GENT  
RUMBEKE

C. Bernaert, Pelgrimstraat, 1  
M. De Valck, Meulestedesteenweg, 487  
Maurice Tanghe

#### West-Vlaanderen

BLANKENBERGE  
BRUGGE  
KORTRIJK  
LEDEGEM  
LICHTERVELDE  
OOSTENDE  
ROESELARE

Fr. De Zutter, Wetstraat, 101  
F. Roose, G. Gezellelaan, 15  
P. Mattelaer, apotheker, Voorstraat, 40  
F-ino Quagebeur, Statiestraat, 39  
Kam. Ferijn, Wetstaat, 47  
Maurice Hessens, Blauw Kasteelstraat, 86  
H. Braekevelt, Statedreef, 177

flandra  katoliko

Maandblad van het  
Katholiek Vlaamsch  
Esperanto-Verbond  
K. V. E. V.

Monata Organo de  
la Flandra Unuiĝo  
Katolika Esperantista  
F. U. K. E.

Redakcio: Patro C. v. Hoogstraten, O. Praem., Abatejo Grimbergen. (B)

Abonoprez: 15 fr. Kun membro F.U.K.E. kaj I.K.U.E. 20 fr. Abonoprez por eksterlando 20 fr. P-konto 412.354 K.V.E.V. Aalst

## SUPOZU...

FOR LA NEŬTRALECON!

Supozu ke, ekde kiam la kinematografio estis eltrovita, la katolikoj tuj estus ekspluatintaj tiun eltrovaĵon, farante filmojn de bona tendenco aŭ minimume sen malbona tendenco, tio estas, filmojn ne nur pli malpli religiajn sed ankaŭ amuzajn filmojn de bonaj romanoj, filmojn en kiuj decaj okazaĵoj ludiĝas en decaj cirkonstancoj. Tiam nuntempe la bonaj filmoj estus multnombraj kaj niaj kristanoj nur vidus kaj nur vidi volus tiujn senriproĉajn filmojn; ili abomenus la maldecajn filmojn, la filmojn kun malbona tendenco, kiel nun, precipe en certaj landoj, la kristanoj abomenas la legajojn kun malbona tendenco. Tio signifus ke la bona kompreno pri dececo kaj maldececo estus konservita ĉe milionoj da homoj, en kiuj nun la ĝusta kompreno pri dececo estas tute aŭ parte detruita; tio signifus ke tiom da milionoj da homoj estus nun pli kristanaj kaj do pli feliĉaj, kiuj nun fariĝis materiale kaj morale malfeliĉaj, sekve de la influo de la malbonaj filmoj. Entute tio estus efikinta nedirekte kaj direkte netakseble grandegan bonon, kiu estus influinta la tutan mondon. Sed bedaŭrinde..... tio estas nur supozo. La filmo ĉiutage detruas kredon kaj bonajn morojn, kaj la mentaleco tiom putriĝis, ke multaj (ankaŭ katolikoj) ne plu trovas amuzaj tiujn filmojn kiuj

estas koncerne ĉion tute neriproĉeblaj. Kaj oni ne plu rimarkas la malbonan influon kiun oni suferas.


Supozu, ke la katolikoj ne ekuzas Esperanton por la disvastigo kaj subteno de siaj principoj, ke ili atendas ĝis kiam Esperanto venkas sen ili, venkas ĉe niaj kontraŭuloj, kaj ke la katolikoj, kiuj jam estas Esperantistoj, ne agas en Esperantujo kiel KATOLIKAJ Esperantistoj sed nur kiel neŭtralaj homoj, por kiuj PRAKTIKE, kompreneble ne teorie, ĉio estas bona, kio uzas aŭ subtenas Esperanton. Tiam sekvus el tio, kiel jam okazis en filmkampoj, ke Esperanto fariĝas armilo kontraŭ ni, ke la Esperanta gazetararo, literataro, ktp., tuta Esperantujo fariĝas al ni malamika. Kontraŭe, se ni katolikoj jes akceptas Esperanton kaj faras tion unualoke por niaj sanktaj idealoj, tiam estos la sekvo ke Esperanto, anstataŭ kontraŭstari nin, servos grandskale niajn katolikajn interesojn kaj per tio ankaŭ la tutan homaron, ĉar veraj katolikaj interesoj estas ĝeneralaj interesoj.

Katolikaj Esperantistoj, ĉu vi komprenas tion? Se jes, tiam vi ankaŭ komprenas ke vi ne estu kontentaj esti nur Esperantistoj sed ke vi devas esti KATOLIKAJ Esperantistoj, tio estas, ke vi devas agi katolike en Esperantujo kaj subteni la katolikan Esperantoidealon. Kaj tio nur

estas plene ebla se vi estas membro de katolika Esperantoorganizo. Per via katolika organizo vi ne malutilas al la ĝenerala Esperantomovado, ĉar, kiel ni ankaŭ aliloke diras, la katolika Esperantomovado havas grandan idealon plie ol la neŭtrala movado kaj per tio ĝi estas pli bone vivpova. Tion ankaŭ opinias la konata socialista Esperantisto Lanti, kiu skribis en sia broŝuro « For la neŭtralecon » : « La komercistoj propagandu en komerci-

staj rondoj, la katolikoj en katolikaj rondoj ktp. -- kaj la revoluciuloj en en revoluciemaj rondoj : tiel nia varba agado plej rapide sukcesigos Esperanton. » Do per nia Katolika Esperantomovado ni atingas du bonojn, 1e, ke Esperanto servas al nia Religio anstataŭ malutilas, kaj 2e, ke ni helpas plej pratike al la ĝenerala disvastigo de Esperanto.

C. van Hoogstraten. O. Praem.



## XXIIa I.K.U.E.-Kongreso

5-10 AŬG. ANTVERPENO 1939.

N. B. Tiuj kiuj deziras nur unu aŭ du tagojn ĉeesti la Kongreson, ne devas indiki kiujn tagojn ili ĉeestos sed nur la nombron, sed laŭeble indiku tamen kiujn tagojn ili bezonas ĉambron.

### PROGRAMO

SABATO : Ek de la 4-a h., malfermo de la akceptejo en salono de Concordia, Lange Gasthuisstraat. En la stacidomoj skoltoj deĵoros kiel gvidantoj. Disdono de la kongresdokumentoj. Je la 8-a interkonatiga vespero.

DIMANĈO : Je la 9,45-a : Esperanta prediko de Monsinjoro Erdey (Hungarujo) en la Katedralo.

10-a : Solena S-ta Meso kun pontifika asisto de Lia Eminenco Kardinalo Van Roey, Ĉefepiskopo kaj Primato. Post la Meso kanto de « Nia Sinjorino de Flandrujo » per la fama knabohoro de la Katedralo, kiu ankaŭ aŭdigos la Meskantojn en speciale portio aranĝita muziko.

11.30-a : Solena malfermo de nia XXI-a per Lia Eminenco Kard. Van Roey. Paroladetoj de la prezidantoj de la LKK, de FUKA kaj de IKUE.

15-a : Daŭrigo de la malferma kunsido. Salutoj de la diversaj nacioj.

18-a : Sekcikonveno por la gemembroj de la ligoj de Katolika Agado.

20-a : Prezento de teatraĵo en la belega teatra salono de Concordia.

LUNDO : 8-a : Sankta Meso kaj Esperanta prediko en la Katedralo.

9.15-a : Laborkonveno IKUE.

11-a : Akcepto de la kongresanoj per la antverpena skabenaro.

14-a : IKUE-konveno.

Libera vespero.

MARDO : 8-a : Sankta Meso kun Esperanta prediko en la Katedralo.

9.15-a : Pritrakto de le ĉeftemo : La katolika laborista junularmovado, per nia rel. konsilanto Prof. Beckers.

14-a : Aŭtobusa ekskurso al Lier - Leuven.

20-a : Literatura vespero, kun premioj.

MERKREDO : 8-a : Sankta Meso kun Esperanta prediko en la Katedralo.

9.15-a : Laborkunsido IKUE.

14-a : Laborkunsido IKUE.

17-a : Boatveturo sur la Skeldo. - Libera vespero.

20-a : Konveno por la sacerdotoj, religiuloj kaj seminariistoj.

ĴAŬDO : 8-a : Sankta Meso kun Esperanta prediko en la Katedralo.

9.45-a : Lasta laborkunsido de IKUE kaj fermo de la kongreso.

14-a : Forveturo per aŭtobusoj al Gent kaj Brugge. Ebleco ĉeesti la meze-

pokan Ludon de la Sankta Sango. VENDREDO : Matene forveturo al Luik kaj grotoj de Remouchamps.

## Help de Hongaren !

Hongaarsche katholieke Esperantisten verlangen het aanstaande IKUE-Kongres bij te wonen. Doch dat brengt hun moeilijkheden mee, daar ze hun bijdrage en verblijf-kosten niet mogen opzenden en misschien zelfs niet medenemen, omdat het in Hongarije verboden is geld naar het buitenland te zenden.

Onze leden kunnen hen echter daarin gemakkelijk helpen en wel op een wijze dat ze er zelf nog voordeel van hebben ; namelijk door het koopen van het zeer interessant boek « Unua Eŭkaristia Esperanto Mondkonveno ». Dit boek dat 16 x 24 cm. meet, 160 bladzijden telt en veel illustraties bevat kost 25 frank. Door het geld dat hiervoor binnenkomt wordt het onze Hongaarsche vrienden mogelijk gemaakt het Kongres bij te wonen.

Men kan ook helpen door aankoop van « Vivo de nia Vivo » door Pater A. Bangha S. J. (meditatie over de H. Eucharistie) prijs 7 fr. , of door een abonnement op « Radio de Jesu-Koro », allen uitgegeven door de Bond van het H. Hart te Budapest. De boeken bestelle men bij ons Verkoopinstituut, Egied Segerslaan 14, Wilrijk. C. v. H.

### O P R O E P.

*Er zijn stellig onder onze leden ongekende en gekende talenten op muzikaal, artistiek of letterkundig gebied. Het komitee doet een beroep op hunne bereidwilligheid om tijdens de interkonatiga vespero (dus Zaterdagavond) door een of ander nummer te willen bijdragen tot het veraangenamen van het gezellig samenzijn, hetzij door voordragen, zang of soli op banjo, mandoline, saxofoon, enz.*

*Liefhebbers geven zich aan op het kongressekretariaat of bij een onzer delegitoj. Bij voorbaat dank.*

## REGNUM CHRISTI

Degenen die proefnummers vroegen, gelieven wat geduld te hebben. We ontvingen uit Joegoslavië tot nog toe geen Esperanto-exemplaren.

Daar de Esperanto-uitgave dezelfde inhoud hebben zal als de Fransche en Duitsche, zal het zeker een interessant blad zijn, dat de steun verdient van alle katholieke Esperantisten.

Vertegenwoordiger voor België Kap. Vangeel, Bonheiden.

## ATENTIGO !

La ĉefestraro de I. K. U. E. konsiderante la malfavoran situacion por nia movado, juĝante dezirinda fari sin sendependa de nova situacio, decidis peti sinjoron de Jong en Nederlando provizore funkcii kiel sekretario-kasisto de I.K.U.E. La ĉefestraro do petas provizore ĉion sendi al :

*S-ro de Jong, Roelofarendsveen, Nederlando,*

*ĝis venos pli favora tempo.*

*P. Heilker, Prezidanto de I. K. U. E.*

## AL ANTVERPENO !

### LA KATEDRALO.

*(prelego de f-ino M. De Rop en kunveno de S. I. K.)*

Ni aŭdis jam multajn parolvicojn kaj ĉiuj estis tre interesaj. Ĉi tiun vesperon mi intencas paroli al vi pri nia katedralo. Mi esperas ke ankaŭ mia prelego interesos vin.

Kie nun sin levas la katedralo antaŭe estis preĝejo. Tiu preĝejo posedis la miraklan bildon de « Onze Lieve Vrouw op 't Staaksken » (Nia Sinjorino sur la paliseto).

En 1124 ekloĝis tie la kanonikoj de Sankta Mihaelo kaj plivastigis la preĝejon. En 1352 oni komencis la konstruon de la nuna katedralo sub la direktado de Jan Appelmans. Multe da aliaj konataj arkitektoj daŭrigis la taskon.

La internaĵo estas eksterordinare vasta. La ĉefnavo estas duoble tiel alta kiel larĝa. Ses flanknavoj, subportataj per 125 kolumnoj, ĉirkaŭas la ĉefnavon. La ĉefaltaro figu-

ras la Ĉieliron de Maria. Oni vidas ankaŭ tie la bildojn de la 4 Evangeliaĵoj, verkitaĵoj de Cornelius De Smet, kaj en la ĥorejo la konataĵon altseĝaron, verkon de De Boeck kaj Van Wint, el 1826.

Pentraĵo de Cornelius Schut ornamas la altegan kupolon de la ĥorejo.

Ĉirkaŭ la ĉefaltaro troviĝas la diversaj altaroj de la estintaj metioj. En la kapeloj oni vidas tre antikvan bildon de la Sankta Virgulino kun la Diinfano sur la brako; la tombomonumenton de Ambrosio Capello, sepa Episkopo de Antverpeno; la tombŝtonon de Kristofel Plantin, fama presisto kaj el-

donisto; pentraĵon, prezentanta la « Lastan Juĝon ». Malantaŭ la ĉefaltaro estas la tombo de Isabela de Bourbon, dua edzino de Karlo la Maltima. Tie ni vidas ankaŭ pentraĵon: « La morto de Nia Sinjorino », de Abraham Mathys.

La katedralo posedas diversajn majstroverkojn, « La Dekrucigo », « La Rezurekco » kaj « La Krucumo » de Rubens; « Francisko de Asiso » de Murillo kaj « La Sanktmanĝado » de Marten De Vos.

La artaj konfesejoj estas la verko de Pieter Verbruggen.

La katedralo estas fama, ĝi prezentas la 4

## Vizitu

# BRUGĜON

## dum nia XXIa!

« La tuta urbo estas kvazaŭ muzeo. Ĝiaj atmosfero kaj ĉarmo estas unikaj. Ĝi estas juvelo de netaksebla valoro. » Tiel parolis Reĝo Leopoldo II dum la malfermo de la ekspozicio de la Flandraj Primitivoj en 1902.

Tiuj vortoj enhavas ĉion kion oni en larĝaj kolonoj povus skribi.

Multajn nomojn oni donis al Brugge: « La Venecio de la Nordo », — « La Mortinta Brugge », — « Brugge la Bela », — « La mistika Brugge » kaj oni povus aldoni: « Brugge Muzeo-urbo » Muzeo, kie oni retrovas rememoraĵojn el longtempe pasintaj epokoj; muzeo kie ĉio parolas pri beleco, piemo kaj admiro; muzeo en kiu oni vivas kaj parolas. Netakseblajn artkreaĵojn oni tie trovas ĉiutage. La tuta urbo estas juvelo kaj la fremdulo lasas tie ĉirkaŭvagi sian admirantan rigardon, ne satigante.

Ĉio kio frapas la okulojn parolas al vi pri la Mezepoko kiam Brugge estis potenca kaj riĉa.

Ĝiaj antikvaj konstruaĵoj, ĝiaj majestaj turoj, ĝiaj pentrin-daj vidaĵoj, ĝiaj pitoreskaj kajoj, laŭ kiuj blankaj cignoj antaŭenglitas, ĉio donos al vi la impreson ke multaj jarcentoj haltis tie ĉi.



kontinentojn. Ĝi estas verko de Mihaelo Van der Voort.

Nur tri el la fenestroj estas antikvaj. La 1a estas donaco, el 1503, de Henriko VII, reĝo de Anglujo; la 2a, de 1508, estas donaco de Engelberto, grafo de Nassau, margrafo de Antverpeno; la lasta, de 1616, prezentas la ĝojan eniron de Alberto kaj Isabela.

En la malantaŭa parto de la preĝejo pendis granda Kristobildo. Tiu bildo troviĝis en certa loko de la urbo, kaj estas en 1896 transportita al sia nuna loko. Nia katedralo do vere meritas viziton.

## Promenado tra Antverpeno.

(alia prelego de la sama S. I. K.-anino).

Mi rakontis jam pri nia Katedralo, kiu eble estas la plej bela en Belgujo. Nun mi parolos pri kelkaj vidindaĵoj en Antverpeno.

La Urbdomo, en la granda Placo, estis konstruata en 1565. Post du jaroj ĝi forbruliĝis kaj estis rekonstruata en 1579. Ĝiaj salonoj estas ornamitaj per famaj murpentraĵoj.

En la granda Placo estas kelkaj belegaj fasadoj el la mezepoko; no 3, nomata: « La Blanka Anĝelo », no 5, kun, sur la pinto, la bildo de Sankta Mateo, patrono de la barelistoj. Ankaŭ n-roj 7—9 kaj 11 estas belegaj. No 38 estas antikva gildejo de la drapopretigistoj, no 40 antikva domo de la haŭtpretigistoj, kaj poste de la lignajistoj.

Inter la monumentoj oni unue devas menci DE HALLE (la Halon) sur la Markt, (granda Placo) konstruata en 1248. La majesta 80 metrojn alta turo entenas la belegan « Zegeklok » (venkosonorilon) fanditan en 1680 kaj pezan 14.000 funtojn. En la plej supra etaĝo pendas la famkonata sonorilaro aŭ « beiaard » konsistanta el 47 sonoriloj kiuj kune pezas 55.160 funtojn kaj kiuj estis fandataj en 1743 de Joris Dumery.

MARKT KUN BELFRIDO


En la mezo de la Granda Placo vi vidas la statuon de Brabo, bildo de la legendo pri la origino de la urbo. Jen tiu legendo:

Ĉe la Skeldebordoj loĝis, en kastelo, grandegulo, nomita Antigonon. Li haltigis ĉiujn ŝipojn, kiuj preterpasis lian domon kaj postulis vojdepagon de la ŝipistoj. Se ili ne pagis, li dehakis iliajn manojn kaj ĵetis tiujn manojn en la Skeldon. De tio la origino de la nomo Antverpeno (ant aŭ hant = mano; werpen = ĵeti). De malproksime venis ĉiam vireto, Brabo, kiu batalis kontraŭ Antigone kaj venkis lin. Li dehakis la manojn de la grandegulo kaj ĵetis ilin en la riveregon. La bildo montras Brabon, venkanta Antigoneon kaj tenanta la dehakitan manon de la giganto.

Sur la Skeldebordo leviĝas la antikva kastelo, nun muzeo de antikvaĵoj, nomita « La Steen ». Ĝi estis konstruata en la Xa jarcento.

La nubskrapulo, nomata « Boerentoren » (turo de la kampuloj) estas alta 88 metrojn, kaj havas 24 etaĝojn. De el la supra etaĝo vi havas belegan panoramon de la tuta urbo kaj de la ĉirkaŭaĵo.

Antverpeno havas ankaŭ zoologian ĝardenon, en kiu estas pli ol 5000 bestoj, en palacoj kaj modelkaĝoj. Tiuj kaĝoj situas en vastega ĝardeno, vere belega parko. Maloftaĵo estas ankaŭ la akvario. La tuta institucio estas grava ĝuejo kaj estas facile vizitebla de la vojaĝantoj, ĉar ĝi situas flanke de la Centra Stacidomo.



## Kongresistoj, al BRUĜO!

LA PLENAERA PREZENTADO DE :  
SANGUIS CHRISTI (SANGO DE KRIS-  
TO) EN BRUĜO.

Ĉu vi iam vizitis la antikvan urbon Bruĝo?

Ĉu jes? Tiam vi certe estas varma admiranto de ĉi-tiu mezepoka, belega urbo, kies ĉarmo ne dependas de larĝaj aleoj, borderitaj de splendidaj kaj imponaj konstruaĵoj, sed male de la impresoj de maljuneco kaj de intensa flandra vivo, kiu ŝvebas en la mallarĝaj stratetoj; de la kvieto, kiun oni « sentas » en la pentrinda Beginejo; de la lumo, ludanta en verdaj makuloj sur la akvo de la kanaloj kaj kanaletoj, kiuj zigzagas tra la urbo; de la arttrezoroj, kiuj estas formetitaj kelkfoje en nesupozitaj lokoj, sed kiuj sentigas sian influon ĉie; de la mil kaj unu « nepalpeblaĵoj », kiujn oni ne povus klarigi nek eĉ esprimi, sed kiuj parolas tiom elokvente al niaj koroj.

Ĉu ne? Tiam vi devus viziti ĝin. Vi havas unikan okazon por fari tion en la plej bonaj kondiĉoj.

La XXIa Kongreso de IKUE okazos ĉi tiun jaron en Antverpeno, kaj la LKK antaŭvidas ekskurson al Bruĝo. Dum la posttagmezo vi havas la eblon vidi iom de la neelĉerpeblaj belecoj de la urbo, kaj je la 9a vespere, vi povos ĉeesti la faman teatra-

ĵon « Sango de Kristo », verkita speciale por Bruĝo, en 1938, de Patro Jozef Boon, C. SS. R., kaj reprezentita 6 fojojn dum Aŭgusto 1938.

Oni antaŭvidis nur kvin prezentadojn, sed la grandega sukceso devigis la organizintojn aldoni sesan prezentadon.

La teatraĵo grupigas 2000 personojn, kiuj ĉiuj estas diletantoj aŭ burĝoj, kaj kiuj ludas nur pro la kaŭzo, sed nek por mono, nek por famo.

Ili eĉ ĉiuj restas nekonataj en la sennoma multego.

Ili dum multe da monatoj donas sian tempon kaj ŝviton por la ripetadoj; kaj fine ili ne « ludas », sed « travivas la ludon ».

Dumtempe, la scenejo estis konstruita apud la Belfrido.

La unua prezentado estis magia spektaklo. La granda placo estis okupita de milkapa amaso, kiu, senbrue, rigardis kaj aŭskultis la dramon kanton de Bruĝo, pri ĝia plej valora trezoro: la Sango de Kristo.


Estas la tragedia historio de la Sango de Kristo kaj de la savo de Bruĝo per Ĝi.

Jus antaŭ ol la teatraĵo komenciĝas la honorilo sonas, kaj poste laŭparolilo anoncas la prezentadon.

La turo fariĝas silenta kaj malhela, sed subite ĝi estas iluminata: anĝeloj, la belegaj, satenvestitaj anĝeloj de Memlinc, de Van Eyck, ĉirkaŭas la Belfridon, elvenas de ĉiuj fenestroj, supreniras la ŝtuparojn de la scenejo kaj ekkantas.

La agado estas komencata.

La prologo nur estas kantiko de la oraj



LA « POORTERSLO-  
GE » (burgologio), sur  
la Jan Van Eyckplaats,  
antaŭe la ejo de la kaval-  
iroj de la Blanka Urso,  
kiuj akiris grandan fa-  
mon pro sia lerteco en  
la turniroj, nun servas al  
deponejo de la ŝtataj ar-  
ĥivaj dokumentoj. LA  
MALNOVA PESILEJO  
ankaŭ sur la Jan Van  
Eyckplaats estas trafa  
pro sia belega fasado.  
Tie estas nun la urba bi-  
blioteko.

JAN VAN EYCKPLAATS  
ANTIKAJ FASADOJ

anĝeloj, kiuj petas la Dian benon por la prezentado. Sed la lumefektoj estas splen- didaj: oraj radioj, verdaj, fajraj, ĉiuj la ko- loroj de la primitivaj flandraj pentristoj.

La unua parto ludas en Jeruzalemo dum la mateno de la Sankta Vendredo. Oni vi- das la sangantan Dian figuron de Kristo, trenita antaŭ Pilato, dum la grupo de popol- agitantaĵoj faras sian eblon por inciti la po- polon kontraŭ Jesuo. La silentaj, malĝojan- taj anĝeloj restas post la forkurado de la kantanta popolo, kaj ploras kun la Virgu- lino Maria, kiu venas kun Sankta Johano kaj Jozefo de Arimateo kaj plorantaj virinoj.

Oni preskaŭ imagus ke la pentraĵo de Isenbrandt malsupreniris de la muroj kaj viviĝas sur la scenejo.

Sed Maria priploras Sian Dian Filon, kiu preterpasas, portante Sian Krucon, kaj irante Kalvarien. Veronika venas, purigas la vi- zaĝon de Kristo; kaj oni vidas la mondsan- vantan morton de Jesuo. Jozefo de Arimateo estas tie, sub la Kruco, kaj kolektas la fluantan sangon en ora pokalo.

La dua parto agas dum la Mezepoko, ki- am la grafo, Dideriko de Elzaso, revenante el la 4a krucmilito, alportas la Sanktan Sangon el Jeruzalemo al Bruĝo.

La urbo estas silenta kaj malĝojanta, ĉar la grafo ankoraŭ ne revenis de la krucmili- to. Ĉiuj estas preĝantaj kaj atendantaj..... Sed, neatendite, alvenas sendito de la gra- fo, kiu anoncas la bonan novaĵon: Dideri- ko venas kaj alportos la Sangon de Kristo. Tuta la placo subite estas kovrata de dan- canta aŭ ekkrianta popolo, de monaĥoj, ĉe-

valoj, kavaliroj, krucmilitantoj; la infanoj venas por eskorti la Abaton de la Sankta- Berlinomonaĥejo: Leonio, kiu portas la grandvaloran relikvon. Fine la ĉefpastro de la urbo benas la popolon kun la relikvo, kaj ĉiuj foriras.

Dum la tria parto, oni ĉeestas unu el la plej malĝojaj epizodoj de la historio de Bruĝo: la proreliĝiaj militoj.


La urbo estas venkoprenata de la malami- koj de Kristo, la fidelaj gardistoj estas grave vundataj, kaj oni nur ĝustetempe povas kaŝi la karan relikvon. La popolo preĝas, sed poste... forkuras.....

Sed la Virgulino Maria, la « Mater Dolo- rosa » de Bruĝo gardas la urbon..... Si ve- nas, helpas la popolon, resanigas la loĵan- lan gardiston de la turo, kaj, ĉirkaŭata de la bruĝaj patronoj: Sankta Donaciano, Magdalena, Valburga, Anna, Jakoba, k.t.p. ŝi ricevas la honorigon de la popolo de Bruĝo: puntan mantelon kaj oran kronon. La simbola figuro de Jozefo de Arimateo reap- peras, portante la pokalon kun la Sankta Sango; kaj la prezentado finiĝas en vizio de Kalvario. Supre: la Kruco; meze: la Virgulino Maria ĉirkaŭata de Sanktuloj, de anĝeloj, de preĝantaj viroj. Kaj centre: la ora pokalo.

Mi ne estas kapabla rakonti al vi la ne- forgeseblan feliĉon, kiun mi ĝuis, vidante tion belegan spektaklon. La unikaj lumefek- toj, la religia silento de la ĉeestantoj, la pia atmosfero, la entuziasmo de la aktoroj, la severa beleco de la Belfrido en la fundo la dolĉeco de la somera vespero formis tuta-

Pli ol iu ajn urbo en la mondo Bruĝo ĝojigas tiun kiu volas lasi oku- lon kaj spiriton ĝui en nemakulita beleco. Dank' al ĝia bonega lokiĝo la Venecio de la Nordo » estas unu el la plej vizi- tataj kaj plej taŭgaj turismocentroj de Eŭro- po.

Flanke de la urbdomo troviĝas la malnova RE- GISTREJO kun orumita fasado, kaj bronzaĵ bil- doj, kie la Pacjuĝantaro nun havas sidon.



AUGUSTIJNENBRUG

MALNOVA REGISTREJO

jon, kiu kaptis ĝisfunde vian animon, dum la pentrindo de la scenejo ĉarmis vian pribelecen sentokapablon.

Ĝi estis ja centfoje pli bela ol vizito al muzeo.

Cu vi ne venos dum la venonta Aŭgusto

por ankaŭ vidi ĉi-tion? Vi neniam bedaŭros tion, kaj poste vi povas ĝui, kiel mi faras nun, de la rememorigo al unu el la plej belaj vesperoj de via vivo.

Magda De Rop.

### Pro manko de loko la Esperanto Mondo-rubriko ne povas aperi.



**APERIS:**

BAKSIS de L. N. NEWELL. (III)

*Originalaj noveloj el la vivo de Egiptoj. Eldono de L. M. Budapest 73a libro. 150 paĝoj. Formato: 19 × 13. Prezo: 24 fr.*

Plaĉaspekta libro kun certe tre interesa enhavo, personeca rakonto de tipaj okazintaĵoj kaj situacioj ĉe Egiptoj. Sed mi preferus legi tiun novelaron en la angla lingvo, ĉar la Esperanto de S-ro Newell estas malflua, plenplenas je superfluaĵoj neologismoj: adolto, feroĉa, hasta, hurti, inicialo, inocenta, konversi, obskura, spekti. Kaj li ofte uzas banalstilajn esprimojn kiel « ili estis trinkantaj glaciĝintajn trinkajojn ». Li misuzas « sia » p. 56 linio 13a, jarmilaj p. 63 miljaraj, kaj « estas loko studi » p. 112 (por studi.)

Finfine li aldonas bedaŭrinde rakonton, kies loko plej bone estus en firevetoj parizaj. Domaĝe, ĉar kiel mi diris, la enhavo estas sufiĉe tipa, maloftaĵo, kiu permesas al ni konantiĝi pri popolo pri kies nuna civilizo ni ne multe scias.

Nur por plenkreskuloj kaj sub konataj rezervo.


DE LAATSTE VLAAMSCHE IJSLAND-VAARDERS. (V)

*Uitgave Juul Fillaert, Kokstraat Nieuwpoort. Prijs 20 fr.*

De Heer Juul Fillaert, die allerlei oude oorkonden gaan raadplegen is, vertelt ons hier op volksche wijze over den heldentijd onzer visschers, vizioenen en ongelukken, over hun Noordpoolleven, en ook over hun leven tehuis: echte folklore met zooveel bijzonderheden dat we ons in hun midden verplaatst voelen, en de typische bonkige kerels met dikke blauwe broek en vest, blauwe gebreide baai rond den hals en blauwe klak met zwarte klep, denkt U niet aan Permeke? - voor ons zien opdoemen, of dansen op de foedagen voor het afscheid. Typische liederen en talrijke namen van Westvlaamsche plaatsen van belang worden behandeld. Merkwaardig zijn ook de illustraties verzorgd door 'n ongeletterde oud-ijslandvaarder.

Werkelijk 'n boek waar liefhebbers genoegen zullen aan beleven.

COLO



LA HOSPITALO DE LA SANKTA JOHANO, antaŭ nelonge riparita, konstruita en la XII-a jarcento posedas seson da aŭtentikaj verkoj de la granda Majstro Hans Memling. Ĉiujare miloj da turistoj admiras tiun mondfaman kaj nekompareblan trezoron.

HOSPITALO de Sankta JOHANO  
MEMLING-PENTRAĴO

EIGEN TAAL ALS ESPERANTO door J. H. ROOSDORP. (V)

*Uitgave A. E. Kluwer, Deventer. Prijs: 42,50 fr. - Formaat: 25 × 16. 154 bladzijden met afzonderlijke woordenlijst 24 bl.*

Een eigenaardige methode om Esperanto aan te leren, de schrijver zelf noemt het boek « Een logische ontwikkeling van eigen taal in ordening en eenheid van internationale taal ».

Inderdaad kan men langs de Nederlandsche taal en spraakleer om, de wereldtaal Esperanto aanleeren, en schrijver heeft dit op een merkwaardige, wetenschappelijke en logische manier doorgedreven.

Dit doet natuurlijk alle vroegere systematisatie te niet, en laat U toe het werk te gebruiken voor ongeleerden zoowel als voor intellectueelen. Edoch valt ons die indeeling niet mee: te eentonig.

Een ander bezwaar is het gevolg van de logisch doorgedreven methode van schrijver - slechts na 300 paragrafen is er sprake van het werkwoord, zoodat al wat voorafgaat aan voorbeelden, doode zinnen zonder werkwoord zijn. Of dat niet vervelend zal zijn voor de leerlingen? Ook de fragmentarische studie der Esperanto-spraakleer kan soms wel tot misverstand aanleiding geven: zoo leeren we dat « met » = « kun ». Talrijke bladzijden later - dagen of weken later - vernemen we dat « met » ook = « per ». De theorie der samengestelde tijden is bondig maar correct gegeven.

Nopens de uitspraak slechts één woord-

je: de schrijver betreurt dat in de Plena Gramatiko de Esp. van Kalokcsay en Waringhien de klanken « e » en « o » niet volgens de allereenvoudigste fonetiek van Esperanto aangeleerd worden en we zijn het met hem hierover eens, doch niet wanneer hij « karafo » doet uitspreken als « kaa-raa-fo ». De bijgevoegde uitgebreide lijst, 'n echt woordenboek, zal veel diensten bewijzen aan de studenten die de kans hebben met dit rijk gedocumenteerd en logisch samengesteld boek de wereldtaal Esperanto te leeren.

COLO

LA HISPANA TRAGEDIO - JEF LAST (I)

Dua libro el la romanserio de F. L. E.

Pri tiu ĉi libro ni donos recenzon en sekvanta numero, sed nun jam atentigas ke ĝi ne estas nur militohistorio, sed libro kun multaj atakoj kontraŭ la Katolika Eklezio, propagandilo por la komunismo kaj tial malpermesata por legi.

C. v. H.


ŜI de H. RIDER HAGGARD (IV)

*el la angla originalo tradukis G. J. Degenkamp. Eldonis: Esperanto Publishing Company Ltd. Londono. Prezo: 29 fr. 280 paĝoj. Formato: 20 × 15.*

Unu el la plej elstarantaj anglaj romanoj, kiun multaj el ni jam legis ĉu en la originala lingvo, ĉu en la franca aŭ la flandra lingvoj. La aventurema Rider Haggard kapablas rakonti lerte kaj streĉe; li tiel fantaziumas ke kelkfoje oni kredus

La majestaj URBOPORDEGOJ konstruita sur la antaŭaj fortikajoj de la urbo, trafas la vidantojn per sia gracia konstruo; LA ROZENHOEDKAAI, DIJVER, GROENE REI, SPEELMANSREI, AUGUSTIJNENREI, la malnovaj Hansodomoj kaj ĝenerale multaj stratoj kaj placoj en Bruĝo estigas la admiron de la vizitantoj.

EZELPOORT



ke li priridas la naivecon de la leganto. Nur kiam li filozofias, li tute ne taŭgas. Cetere li majstre verkas siajn romanojn kaj li kaptegas la atenton de la legantoj per siaj eksterordinaraj priskriboj kaj la strangaj aventuroj de siaj herooj.

La plej bela virino en la mondo, Ŝi-kiu-estas-obeenda, atendas dum 2.000jaroj la revenon de ŝia amanto kaj kiam li fine venas... nu, legu vi mem, vi scios la teruran, kortuŝan finon.

Ĉar mi ne legis la originalan verkon, mi ne povas diri ĉu S-ro Franzman pravus, skribinte en « Lagrafa » ke el la delikata poeziplena rakonto, S-ro Degenkamp faris... pornografion. Mi certe spertas ke li kelkfoje malbone tradukis anglajn esprimojn, kiel « light » lumo anstataŭ flamo, malbone uzas SIA, de (da), KIA, kaj kelkfoje uzas nederlandismojn.

Resume la libro estas bona pliriĉigo de nia literaturo, sed mi konsilas al la tradukistoj ĝenerale, nur sin dediĉi al tradukoj de propralingvaj libroj.

La ekstera aspekto de la libro estas luksa kaj ege plaĉas.

**LA RINGO DE LA GENERALO** de SELMA LAGERLOF (V)

*Tradukis Stellan Engholm. Eldonis : Soc. Esperanto Stockholm. - Prezo : 15 fr. - Formato : 20 × 13. Paĝoj : 126.*

Plaĉaspekta libro kun bela kovrilo de-segnita de la sveda artisto Karin Ageman. La legado de libroj de Selma Lagerlöf neniam tedas, ĉiam estas ĝuo por la spirito, la koro kaj la fantazio. Tie ĉi ni havas belan ekzemplon de la tre persona stilo de la fama « fabelrakontistino ». Tamen personoj, kiuj timas fantomojn, ne legu ĝin...

La traduko estas sukceso, oni legas la Esperanto-tekston kvazaŭ originalon, io, kio nur malofte okazas en nuntempaj tradukoj : cetere Stellan Engholm estas jam konata pro sia taŭga traduko de Gösta Berling. Nur 3 etaj rimarkoj : p. 16. Kiel statas por (pri ?) li P. 60 riskus (elmeti al danĝero = endanĝerigus?). P. 108 ŝi lasis la fraŭlinon zorgi pri si, lasis ŝin kombi (devus esti pri ŝi, ĉar zorgi havas alian subjekton).

Bela perlo en nia esperanto-literaturo.

COLO

**KOMPATINDA KLEM** de JOHN MERCHANT. (V)

*Eldonis Esperanto Publishing Co Ltd. Londono. 94 paĝoj. Bindita. Formato 19 × 13 Prezo : 12 fr. Broŝ. 9 fr.*

Ni ĉiuj konas la humurplenan verkon « Tri Angloj Alilande » de la sama verva aŭtoro, kaj la legado de « Kompatinda Klem » ne estis por mi seniluziigo. Tiom multe da « originalaj » verkistoj donacas al ni legajon, kiun ni formetas post legado de la unuaj paĝoj, sed John Merchant posedas veran verkistan talenton, li cetere estas anglo kaj kapablas sprite ĉerci. Aliflanke la propagando por nia kara lingvo, kiu enestas tutnature en la rakonto, pli-grandigas nian simpatian por la aŭtoro kaj lia verko.

Nur kelkaj eraroj : p. 27 speco « da » drako (de). p. 35 areto de alilandanoj (da). P. 55 ventumiloj (windmolen = ventmuelilo). P. 76 kune kun lia filo (sia).

COLO

Bestelt al uw Esperantoboeken op het *Katholiek Esperanto Instituut*, Egied Sengerslaan 14, Wilrijk, postrekening Nr. 4549.84. Dus *niet* meer : Vendoinstituut met postrekening Nr. 1194.82 van D. Mortelmans.

### Plibonigo

Radio Romo sciigas nin, ke nia informo en F. K. No. 4 pri la Esperantoelsendoj de la Stacio E. I. A. R. ne estas kompleta. La dua alineo de tiu informo estu jena :

ROMO, LUNDE : de 20.50 horo ĝis 21.10 horo, per la stacioj 2 RO 6 (19.61 m.) kaj 2 RO 9 (31.02 m.) kaj eventuale per stacio Romo II (245 m.), por la semajna informo bulteno.

En la tria alineo 19 horo kompreneble estu 18 horo.

### GRATIS.

Al onze leden en alle reeds betaaldhebbende kongressisten kunnen in Flandra Katoliko een aankondiging plaatsen van 20 woorden, die betrekking heeft op het aanstaande wereldkongres van katholieke Esperantisten. Men zende de tekst rechtstreeks aan de redactie.



Kat. Rondo Esp-ta Mortsel.

La 24-an de Marto, S-ro Lodema flue kaj sprite parolis, laŭ propra sperto, pri la vivo sur nederlanda milita velŝipo antaŭ kvardek jaroj. La dana gimnastikisto, S-ro Weling, agrabligis la kunvenon per kelkaj lertaj elmontraj de sia talento. Ambaŭ rikoltis sukceson kaj dankon.

La Lovena Kruco.

Per la printempo kaj la fino de nia vintra kurso, nia juna grupo ricevis novan sangon. Malgraŭ la gripo, kiu je nia bedaŭro, fakte iom falĉis inter la lernantoj, la kurso estis kontentige vizitata ĝis la fino ; certe dank'al la lerta kaj agrabla gvidado de S-ro Van den Eynde, kiu eĉ speciale deziris pluprepari la fidelulojn por la ekzameno.

Ni kore invitas ankaŭ la geamikojn el nia regiono veni al la ekzameno en Loveno (Leuven) kaj konatiĝi kun ni. Petu tempe informojn.

S. I. K. -kunveno de 20 Marto.

S-ro Van Deun prezidis la kunvenon pro forresto de S-ro Goethaert, malhelpata. Malfermo per la preĝo. Ĉiuj niaj klubanoj jam konas parkere la Nia Patro'n kaj la Anĝela Saluto'n. Vorto pri la parolado de Frato Van Zon estis dirita kaj ni nur bedaŭris ke tiel malmultaj personoj ĉe estis. Dankvorton S-ro V. D. direktis al S-ro Mortelmans kiu gastigis Fraton Van Zon kaj S-roj Claes kiu zorgis por la leĝejo. Okaze de la internacia situacio, li aludis al la kruela bato, kiu denove trafas la Esperanto-movadon pro la perdo de Ĉeĥoslovakujo, kiu estis lando, kie la movado estis ege vigla. Tie ankaŭ nia Espero Katolika estas presata kaj li esprimis la esperon ke la estraro de I. K. U. E. baldaŭ trovos solvon por ke la regula apero de tiu revuo daŭru. Li anoncis ke nia vigla Prezidanto de F. U. K. E. jam faris paŝojn tiucele.

La sekretariino poste legis la raporton pri la antaŭa kunveno.

Post la kantado de « Mi havis kama-

radon » S-ro Van Deun donis la parolvicon al S-ro V. d. Bergh, por la leciono « Ni lernu per la eraroj ». Per tipaj frazoj, plenaj de eraroj, li donis la okazon al la ĉeestantoj korekti kaj trovi la erarojn kaj samtempe disvolvigis priparolado pri pri tiuj frazoj. Pluraj sin montris tre spertaj en tiu fako. Koran dankvorton la prezidanto direktis al S-ro V. d. Bergh kiu plenumis tre interesan punkton de nia tagordo. S-ro Peelman akceptis gvidi la sekvantan lecionon.

La rezultoj de la 8-a konkurso estis komunikataj, kaj la 9-a disdonata kaj klarigata.

Pro troa okupo S-ro Van Deun petis malŝarĝon de la prizorgado de la dua serio. Laŭvice la klubanoj prezentos novajn enigmojn, kaj la unuan vicon akceptis F-inoj De Rop.

Sekvis kuna solvado de silabenigmo kun proverbo, kiu laborigis la ĉeestantaron. Ĝi estis lerniga ekzercado.

La komuna ludo konsistis el trovi plej multe da vortoj komencantaj per la litero « v ».

Post kanto de la Espero, preĝo kaj adiaŭa vorto, ni disiris ĝis la 24-a de Aprilo.

*Ni insiste petas ke ĈIUJ niaj grupoj regule ensendu mallongan raporton de siaj kunvenoj kaj agado. Ili ankaŭ al la publiko konigu siajn eventualajn proponojn ; do ili sendu ilin al nia redakcio. - Redakcio.*

### EXAMENS.

Zooals vorige jaren richt het K. V. E. V. examens in tot het bekomen van diploma A. en B., op de volgende data en plaatsen : LIER : op 30-4-1939. Inlichtingen bij den Heer G. v. d. Bergh, Tanghehoefstraat. 2, Merksem.

ANTWERPEN : Op 14-5-1939 te 9.30 U., Charlottalei 19.

*Inlichtingen bij :* Juffrouw M. De Rop, Verzoeningstr. 34, Bergerhout.

Heer L. Calloens, Erembodegemstr. 29, Aalst.

Heer G. v. d. Bergh, Tanghehoefstr. 2, Merksem.

Heer K. Hartman, Potgieterstr. 1, Antw.

Heer J. Van Deun, Turnhoutschebaan 277, Bergerhout.

LEUVEN : op 21-5-1939, Inlichtingen bij Heer M. Naster, Naamschestr. 113, Leuven.

BRUSSEL : op 18-6-1939, Inlichtingen bij Heer L. Calloens.

Ieder is toegelaten op deze examens.

De prijs van deelname aan examen A. is 10 fr., voor B. 20 fr., op voorhand te storten op postrekening 4123.54 van het K. V. E. V., Aalst. Niet vergeten duidelijk naam en adres te vermelden.

Voor beide graden zal de proef bestaan uit een schriftelijk en mondelingsch gedeelte.

Verdeeling der punten : Schriftelijk gedeelte :

Dictee : 15, Spraakleer : 15, Vertaling uit het Nederlandsch : 15, Vertaling uit het Esperanto : 15, Opstel : 10 punten.

Mondelingsch gedeelte : Lezen : 5, Uitleg : 5, uitspraak : 20 punten.

Het gebruik van een woordenboek is niet toegelaten. De deelnemers gelieven papier mede te brengen en zich van een vulpen te bedienen.

Bezoek van Eerw. Frato WIGBERTUS VAN ZON, L.K. aan Vlaanderen.

Ik ben waarlijk beschaamd zooveel vertrouwen gesteld te hebben in ons Vlaamsch publiek ! Daar waar wij duizenden bereikt hadden met onze propaganda over de spreekbeurten van Frato Van Zon in Aalst en Antwerpen, en er toch honderden hadden verwacht, konden wij slechts enkele tientallen belangstellenden bijeenkrijgen, om den in Nederland zoo gewaardeerde spreker te komen aanhooren.

Deze loomheid of onverschilligheid onzer Vlaamsche kringen - die anders zoo 'n groote belangstelling aan den dag leggen voor bals, carnivals en brutale criteriums - doet mij nog erger pijn, nadat ik, samen met het uitgelezen publiek de puike, fijnzinnige, humorvolle causeries van onzen Noordnederlandschen gast gehoord heb. Zelden hoorde ik zoo 'n aangenaam, bezadigd en toch overtuigend pleidooi ten voordeele van Esperanto. Een vooraanstaande persoon uit de onderwijzerswereld bekende, dat het voor hem een « revelatie » is geweest.

Stellig zal de invloed van dezen krani-gen... pionier (bijna schreef ik... grijsaard,

maar dat durft men niet meer als men Frato Van Zon aan gang gezien heeft !) ons verbond ten goede komen en wij vertrouwen, dat hij kortelings naar Vlaanderen moge terugkomen, waar hij voortaan vrienden heeft die zijn onverwoestbare gegeden overtuiging en zijn gulle hartelijkheid hebben leeren waardeeren.

Lic. L. Calloens, Voorz. K.V.E.V.

## CONTE GRANDE

En respondo al la diversaj unuiĝoj kiuj publikigis artikolojn pri la Esperanto-kurso kaj-vivo sur la itala marŝipo « Conte Grande », Lia Sacerdota Moŝto Agostino Stellacci, ŝipkapelano sendis danke belan bildeton kun la jena bela teksto, okaze de sia 30 jara sacerdoteco :

« Surname 6-3-1939

Al Kristo, Nia Savinto  
Elvokita kaj oferita, ĉiutage,  
dum tridek jaroj  
sur la Sankta Altaro

Sub la itala ĉielo kaj eksterlande  
dum la milito, dumpace  
sur senfina oceano  
la esprimon de mia elkora dankemo  
petante

de miaj Superuloj, parencoj, amikoj, konatoj

repacigoferan preĝon  
por ke mi ĉiam pli sentu  
la sacerdotan noblecon  
kaj honoru ĝin  
per apostola agado kaj sinofera spirito.

Sac. Agostino Stellacci  
Ŝipkapelano « Conte Grande ». »

Al miaj gelernantoj en Antverpeno.

Kortuŝite mi adiaŭis vin post la lasta leciono kaj la delikataj dankesprimoj sub formo de parolado de S-ro Van Deun kaj de unu el vi en sprita alparolado, kaj speciale ŝargita per donaco multe tro ampleksa, kiu ĉiam restos por mi valora memoraĵo pri la belaj vesperoj, kiujn mi pasigis en via mezo, meze de bonegaj lernantoj, idealistaj amikoj kaj estontaj kunlaborantoj. Mi ofte sopiros la jaŭdajn vesperojn venontajn al tiuj kunvenoj, kiuj donis al mi tiom da ĝojo kaj da efikaj rezultoj por nia kara FUKU. Ree koran dankon.  
Via « Esperanto-Patro ».

## « KION ALIAJ SKRIBAS ? »

GAZETO E. R. B.

Jen nova gazeteto de E. R. B. (Esperantista Re prezentantaro Brusela), kiu estas « dediĉita al propagando kaj kunlaboro ». En klariga vorto la redaktoro diras : « ni laboras por Esperanto kaj por kreskigi la landajn organizojn. » Ni pridubas ĉu tiu gazeto povas longtempe vivteni sin, ĉar la Esperantistoj jam kontentiĝas de sia liga organo (kiun ili ofte apenaŭ malfermas) kaj la simpatiantoj pri Esperanto kŭj abonos ĝin ne estos sufiĉe multnombraj, kaj krom tio por ili ĝi ne estas tute ĝuebla ĉar ĝi estas ĉirkaŭe duone en Esperanto.

## FLANDRA ESPERANTISTO

En artikolo : « Utiligu Esperanton per korespondado » ni trovas jenan interesan fragmenton : « Eĉ Esperantaj revuoj ne kontentigas niajn Esperantistojn. Tion pruvas la fakto, ke pluraj ne plu abonas ĝin, ke aliaj daŭrigas la abonon nur por subteni sian grupon, sed eĉ ne malfermas la revuon. Ĉar per kio neŭtrala revuo povas regali siajn legantojn ? Ĝi ĉefe prezentas : sciigojn rilate al la enlanda Esperanta vivo ; pli modere : informojn pri kresko aŭ malsukceso de Esperanto en la eksterlando ; foje lingvan rubrikon, foje mallongan rakonton, foje versaĵon. Unuvorte : oni ekhavas la impreson ke Esperanto estas proponata kiel celo, kaj ne kiel pero por kontaktiĝi kun la alilandaj vivoj kaj privataj ideoj. Alie dirite : oni laŭdas la ilon, sed oni ne realigas la majstroverkon, por kio ĝi estas kreita. »

Ni komentarias : tial neŭtralaj revuoj kaj organizoj pli malfacile vivadas kaj progresas ol aliaj. Ekzemple ni katolikaj Esperantistoj havas gravan celon plie, pli fortan idealon kiu instigas nin al subtenado kaj disvastigado de Esperanto kaj nia katolika movado. Ni pli definite, pli proksime scias kial ni estas Esperantistoj. Krom tio, por ni katolikaj Esperantistoj Esperanto ne plu estas nur celo sed jam

ilo. Ni pensu pri la belega I. K. I., pri niaj internaciaj revuoj kiuj ne estas pri Esperanto sed en Esperanto, kiel Regnum Christi, Vojo-Vero-Vivo, Radio de Jesu-Koro kaj ankaŭ Espero Katolika. Katolika grupo kiu plene konscias sian katolikan Esperantoidealon ne mortos sed progresos. En « Pola Esperantisto » oni plendas ankaŭ pri la neŭtralaj kongresoj, ke ili estas ĉefe amuzaj kunvenoj kiuj malmulte praktikan utilon efektivas. Ankaŭ tio ne estas vera rilate niajn IKUE-kongresojn, kiuj tute ne malatentas la amuzan parton kiel ekskursojn, festvesperojn ktp. sed kiuj ankaŭ pritraktas gravajn utilajn problemojn.

## ESPERANTO

La konata Esperantoverkisto Julio Baghy publikigas en « Esperanto » artikolon pri « Humanisma moralo kaj honesta popolkonscio ». El tiu artikolo ni kopias kelkajn interesajn fragmentojn. « En la konkuro de la potencaj naciaj lingvoj por fariĝi MONDLINGVO ĝuste la Esperantistoj rimarkis DU NEKONTESTEBLAJN INSTRUOJN, kontraŭ kies danĝeroj ili agis PLEJ KONSCIE, PLEJ PRAKTIKE tamen ne forgesante pri la estimoj de la homaj rajtoj. Jen la du instruoj, kiujn ĉiu Esperantisto nepre devas pripensi en la nuna periodo ; kiam kelkloke la popolkonscio, disigita de sia frato, emas skandaladi por malutilo de la malgrandaj nacioj kaj minoritatoj.

I.- Ĉiu fremda nacia lingvo per sia disvastiĝo antaŭenpuŝas siajn naciajn aspirerojn kulturajn kaj politikajn.

II.- La disvastiĝo aŭ DEVIGA instruado de KIU AJN FREMDA nacia lingvo malfortigas la propran nacian konscion kaj ĝian rezistpovon.

Dezirante mi supozas ke la naciismo de la nuna historia periodo efektive volas krei harmonion, bonfarton en la nacia vivo kaj ekster ĝia kadro inter la nacioj. En la intereso de la celo de la naciismo ne forgesu pri TIA defendo de la nacia lingvo, kiu faras la propran lingvon egalranga kun ĉiu alia nacia lingvo. Por tiu egaliga kaj egalrangiga rolo taŭgas sole Esperanto, kiu akcelas la harmonian interrilaton lingvan tie, kie la uzo de fremda nacia lingvo faras unu el la traktantoj, eble eĉ ilin ambaŭ, humiligitoj per flankenŝovo



de la nacia lingvo propra. Nur neŭtrala helpa lingvo, posedajo de neniŭ nacio, povas servi tiel, ke la supre menciitaj danĝeroj estu forigitaj. Esperanto havas grandan gravecon precipe en Mezeŭropo, kie multaj malgrandaj nacioj vivas unu apud la alia en ombro de potencaj nacioj, kies politikaj aspiroj minacas ilin.....

Oni sentas, ke la hodiaŭa naciismo celas SENDEPENDECON en naciaj vivo, lingvo kaj kulturo. En tio ĉi Esperanto, kiel kulturfaktoro, povos pruviĝi utila rimedo. Ankaŭ tion oni sentas, se la nuna naciismo celas certigi la vivrajton de nur DU-TRI GRANDPOTENCOJ sur la Tero, la supremitoj kaj sklavigitoj, la centmilionoj da homfratoj sentantaj la pezan ŝarĝon de la Tempo, en kiu la popolkonscio SEN humanisma moralo havas sole skurĝon por regadi, faros ligan por kontraŭstaro kaj en la efektivigo de la nova ekvilibriĝo oni uzos Esperanton, kiel komunan pritraktan lingvon.

Depost jaroj mi ripetadas, ke la estonteco de Esperanto dependas ne de dekretoj de la grandaj nacioj, sed de la popolkonscio de la malgrandaj nacioj, kies naciaj sendependeco, lingvo kaj memstara kulturo estas senteble minacataj. Konsiderante tiun konstatablan fakton, ke LA NUNA NACIISMO TIMAS SIN MEM, respektive la efikon de la naciismo ne en la propra sed en la najbaraj landoj, oni povas facile konkludi, ke la batalado de la grandpotencoj povos rezulti la finmueladon de tiuj sendependeco kaj kulturvivo, kiujn havas la malgrandaj nacioj. Mi ne pensas sole pri la forto de la armiloj, ĉar cent pliajn rimedojn havas la potencoj por detruji la malfortajn. Al tiuj minacaj rimedoj apartenas ankaŭ LA LINGVO KAJ KULTURO DE LA PLIFORTA POLUNUO.

La Esperantistoj havas la devon averti kaj samtempe direkti la atenton de la popolkonscio al tiu ĉi aktuala kaj efektive facile vundebla punkto, precipe ĉe la malgrandaj nacioj, kiuj kvankam disigite vivas, tamen ili havas KOMUNAJN VIVINTERESOJN por defendi kaj konservi. Ni ne timu deklari nian vidpunkton pri la vivo de la nacioj kaj popoloj, ĉar nian movadon karakterizas, malgraŭ ĉia ŝajno, du bazaj principoj: humanisma moralo

kaj honesta popolkonscio. Tiuj ĝemeloj en nia movado KUNE vivas, KUNE agas kaj KUNE akcelas la finan triumfon de Esperanto. »

### RADIO DE JESU-KORO

Jen denove katolika revuo ne pri sed en Esperanto. Tiu ĉi estas eldonaĵo de la Ligo de Sankta Koro en Budapeŝt kaj celas « disvastigi la kulton de la Plejsankta koro de Jesuo. Redaktoro estas Patro Ferenc Zsiros S. J.

Ĝi estas vere riĉenhava revueto kiun precipe niaj membroj abonnu, kiuj estas ankaŭ membroj de la Ligo de la Sankta Koro de Jesuo.

Jam aperis 4 numeroj. Prezo estas 11 fr. Abonperanto por Belgujo estas Kapitano Vangeel, Bonheiden.

### La Kampkapelo (De Veldkapel)

L. Lambrechts.

R. Ghesquiere.

#### I

En Majmonato svarmas blonduletoj,  
Apud la kampkapel'.  
Ondadas de la tilieg' branĉetoj,  
Ĉirkaŭ la kampkapel'.  
Maria aŭdas litaniojn belajn,  
De la kampulinjanoj kaj abelajn.  
Ave Maria, Ave Maria.

#### II

Multfloran paradizon oni vidas,  
Apud la kampkapel'.  
Kantantaj birdoj en la arbo sidas,  
Ĉirkaŭ la kampkapel'.  
Maria aŭdas dum la vesperbeloj,  
La jubelkanton de la filomeloj.  
Ave Maria, Ave Maria.

#### III

Nur paco regas en la vilaĝeto,  
Apud la kampkapel'.  
Dormeto ĝia kvazaŭ preĝadeto,  
Ĉirkaŭ la kampkapel'.  
Maria aŭdas inter stelradioj,  
Postsonon de la lastaj rozarioj.  
Ave Maria, Ave Maria.

(tradukis Blankulo).

### ⊗ EN LA F.U.K.E.-FAMILIO ⊗

#### Edziĝo.

Nia delegito, H. Brackevelt, en Roeselare eniris la « edzigan boaton » kun fraŭlino Maria

Vuylsteke. F.U.K.E. deziras ke Dio benu la novan paron per trankvila maro kaj multaj sanaj ŝipaj netoj.

#### Naskiĝo.

La familio de Gesinjoroj Meurrens en Loveno, pligrandiĝis pro alveno de filineto. Ni esperas ke ĝi en la Sankta Bapto ricevis belajn nomojn. Al la gepatroj niajn plej korajn bondezirojn.

#### Flandra Katoliko.

Ondanks onze pogingen F. K. in de eerste dagen van April bij de lezers te doen toekomen, werd het toch de 18de van die maand; en dat

wegens onverwachte omstandigheden in zetterij en drukkerij.

We hopen ondanks alles langzamerhand een stipt verschijnen te bereiken. Daarom vragen we dat voortaan alle mededeelingen binnen zijn vóór de tiende van de maand. Bij eventuele niet-ontvangst van F. K. richt men zich tot Mej. M. Bergmans, Markt 19, Mol. Indien men daarop een geschreven antwoord verlangt, voege men er een postzegel bij of gebruike dubbele postkaarten, dus met betaald antwoord.

Ook propagandanummers moeten aan hetzelfde adres aangevraagd worden, en niet op de redactie!

# D I S T R A P A Ĝ O

### SOLVO de la ENIGMO N-ro 3.

La trovota frazo sur la ŝaktabulo laŭ la movoj de la Turo estis:

« Estas la devo de ĉiu fukeano propagandi sian revuon kaj varbi novajn amikojn ».

La forlotumado de la premio okazis je la fino de la daŭriga kurso de S-ro Calloens en Antverpeno. Tiun ĉi fojon F-ino Thijs eliris la nomon de Fraŭlino M. Berg-

### ENIGMO N-ro 6.

Anstataŭigu la nulojn per literoj, tiel ke ĉiuj samaj ciferoj montras saman vorton kaj horizontale kaj vertikale.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
1.-						0							
2.-					0	0							
3.-				0	0	0							
4.-			0	0	0	0							
5.-	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0			
6.-						0	0	0	0				
7.-							0	0	0	0			
8.-								0	0	0			
9.-									0	0	0	0	0
10.-										0	0	0	0
11.-											0	0	
12.-												0	0
13.-													0

### ATENTU!

EN F. K. N-ro 5, en la Distra Paĝo bonvolu aldoni al la klarigo pri la enigmo N-ro 5: .....legataj de supre malsupren, *kaŝas gravan alvokon por vi*. Mankas ankaŭ la lasta punkto ĉe N-ro 8, 10, 14

mans el Mol, kiu do estas la feliĉa gajnintino de la premio.

Por la 6-a enigmo ĉi sube, ni krom kuitiman premion forlutumos duan, donacitan de malnova ano, kies nomon ni ne povas publikigi sed kiun ni kore dankas nome de la gesolvantoj kaj precipe de la gajnontoj. Tiu dua premio estas 100 paĝa Esperanta kurso (valoro 60 fr.).

1 = Vokalo; 2 = Kunjunkcio; 3 = Adjektivo (R); 4 = Grava loko en universitato; 5 = Sola regas; 6 = Certaj veturiloj nepre bezonas (R) - konsonanto; 7 = Duone paroli pri io; 8 = Konsonanto - Necesa en malaltaj landoj (R); 9 = La unua ekzemplero; 10 = Riverego; 11 = Vojo (R); 12 = Silabo el lokomotivo; 13 = Vokalo.

### PREMIO

*Fundamenta Krestomatio de Esperanto de Dro Zamenhof (463 paĝoj).*

Ne forgesu aldoni al la solvo por ĉiu partoprenanto poŝtmarkon de 75 centimoj!

La solvoj devas esti en la sekretariejo antaŭ la 1-a de junio.

kaj 16. Estas alterne tri punktoj antaŭ kaj tri post la cirkleto, kaj du antaŭ kaj kvar post la cirkleto. En kelkaj numeroj tiuj punktoj ne estas videblaj.

La dato de ensendo, pro tiuj eraroj, estas plidaŭrigata ĝis la 15-a de junio

Ni esperas ke tre multaj partoprenos ĝin.

kiun

ciu

Esperantisto

devas posedi

NUR TIU PERSONO, KIU POSEDAS KAJ UZAS ĈI-TIUN VORTARON, MERITAS LA BELAN NOMON: SERIOZA ESPERANTISTO!

**Somnambulo.** Homo nerve malbona, kiu dum dormo senkonscie k memmore iras, parolas k agas kvazaŭ li estus mal-dormanta k konscia. Kp LUNATRO.

\* **Soni** (ntr). 1 Estigi aŭdeblan aervibradon: *barco malplena ~as plej laŭle Z* (tiu plej fanfaronas, kiu malplej meritas); *la londiŭlo ~is akre Z*; *~is tamburoj k flutoj B*; *en la radianta aero la birdoj ~is B*; *la horloĝo ~is tri kvaronojn Z*; *denove ek~is krakoj Z*; *voĉo ek~is de malproksime B*; *ek~is voko K*; *ek~is rapidaj paŝoj B*; *subite ek~is tamburado k fajfado Z*; *tiu ĉi frazo estas nur bele ~anta kolekto da vortoj Z*; *aplaŭdoj tondre rut~is tra la pleneĝa salono*; *el inter la branĉoj la birdoj ~igas sian voĉon Z*. Kp SONORI. 2 Aŭdeble esprimiĝi: *en la malaltaj tonoj de lia voĉo ~is kvazaŭ mal-kontenteco Z*; *denove ~os en la urbo la lingvo de Z*; *tiu ĉi sama peco en stilo esp-a ~us liamaniere Z*. ~o. Aŭdebla aervibrado: *harmoniaj ~oj*; *movi sen~e la lipojn Z*. **Re~i** (x). Resendi la ~on: *kia ~o, lia re~o Z*; *l' aero re~is de bruo lerura*; *nur ĉio sen-anima re~adis miajn plendojn Z*; *la impresoj de liaj tagoj ankoraŭ re~as ĉie en niaj animoj*; *\* bonan nokton \* re~igis la amaseto K*; *liaj verkoj trovas varman re~on en la koroj de la legantoj* (Kp ENI, SONORI). **Post~i**. 1 **Re~i**. 2 **Sonori**. ~anto (Fon). Sonoro naskita de la vibrado de l' voĉkordoj, modifita per la formo de la buŝo k akompanata aŭ ne per bruero. La ~antoj estas daŭrigeblaj k prononcataj kun formiĝo de re~ujo en la buŝo; ili diferencigas de la konsonantoj per tio, ke ili estas silabigaj (Kp VOKALO, KVAZAŬVOKALO, NAZALO, LIKVIDO, SILABO).

**Sonato.** Muzikverko por instrumentoj konsistanta el tri aŭ kvar partoj kun malsamaj movoj.

**Sondi** (lr). 1 Mezuri per liucela aparato la profundecon de akvo aŭ grundo. 2 Esplori per liucela aparato la fundon de akvo aŭ de grundo. 3 (f) Prove esplori: *mi ~as ĉe la kortego Z*; *~i la opinion*.

**Soneto.** Versaĵo konsistanta el 14 versoj dividitaj en 2 verskvarojn k 2 verstriojn.

\* **Sonĝo.** Bildoj k ideoj, plej ofte sen-ordaj k senlogikaj, aperantaj en nia imago dum dormo: *mi havis tre*

*strangan ~on Z*; *~o leruras, ~o ler-leruras Z*. Kp DELIRO, FANTAZIO, RENO, ILUZIO, IMAGO. ~1 (tr). Vidi imago dum la dormo: *kiel malsalanto ~as, ke li manĝas Z*; *ŝi ~is, kvazaŭ ŝi estas ankoraŭ juna knabino K*.

\* **Sonori** (ntr) (pp ilo). Produkti sonon daŭre aŭdigantan post ĉeso de ĝia kaŭzo: *ĉiuj ~iloj de preĝejoj ~is Z*; *en la palacoj ~as luksaj festenoj B*; *~a (facile ĝis mal-proksime aŭdebla) voĉo*; *la entreprenon antaŭ ĉio pereigis ~oj* (f: motaj) *kaŭzoj k la elsekiĝo de materialaj fontoj Z*; *mi ĵaros lian ŝaron, ke al ĉiu, kiu tion aŭdos, ek~os ambaŭ liaj oreloj Z*. Kp SONI, TINTI, VIBRI. ~o. 1 Sono daŭre sonanta post ĉeso de ĝia kaŭzo. 2 (Fon) Regule vibranta sono, havanta diferencigeblan altecon (Kp TONO, BRUERO, VOKALO). ~igi (pp homo estiganta ~on per ilo). Kaŭzi ~on: *bonvolu ~igi al la servisto*. ~igisto. Homo, metie ~iganta la ~ilojn de preĝejo. ~etigi (la glasojn). Interfrapi la glasojn antaŭ ol trinki je honoro de iu aŭ io. ~ilo. Ilo por estiĝi ~on, ĝenerale konsistanta el metala kava duonsfero kun svingebla frapilo. ~ilejo, ~ilturo. Turo enhavanta ~ilojn.

\* **Sopiri** (x). 1 Sufri pro bedaŭro k redetiro al io perdita: *~i al la patrolando B*, *al la hejmo, al ripozo, trankvilo B*; *~i la perditan feliĉon Z*, *pri Z*, *pro Z*, *je la perdita feliĉo Z*; *~i iun Z*; *li lerure ~is vidi ŝin denove Z*; *tien ili ~as per sia animo reveni Z*; *rano ĉe en palaco ~as pri morto Z*. 2 Sufri k malĝoji pri ia dezirego: *kiel cervo ~as al fluanta akvo, tiel mia animo ~as al Dio Z*; *li ~is senmezure pri la morgaŭta tago Z*; *~i pri pli altaj spiritalaj plezuroj Z*; *multaj homoj ~as je flugiloj k lute forĝas, ke piedojn ili havas*. 3 Esprimi per forta longa enspiro aŭ per plenda ĝemo sian bedaŭron aŭ deziregon: *~e diri B*; *~e silenti*. ~o. 1 Stato de iu, kiu estas ~anta: *liu ekregis neesprimebla ~o*. Kp ASPIRO, MELANKOLIO. 2 ~ĝemo: *legendoj, liaj estas kvazaŭ ~oj de l' homaro B*.

\* **Soprano.** Plej alta voĉo de virino aŭ juna knabo.

\* **Sorbi** (lr). 1 (iu) Enspirante altiri fluajn ion post ion en sian buŝon: *~i krudon ovon*; (f): *multe da ĝupo k da maldolĉa aftiklo ni senkonsidere ~is el la*

Wilt ge steeds veel volk op uw vergaderingen? — Geef een uurtje FILM!

Het Katholiek Smalfilm Studio van Antwerpen biedt U een interessante keuze van documentair- speel- en teekenfilms.

Specialiteit van reportages: 17e IJzerbedevaart. VI. Nat. Zangfeesten. Pater Damiaanfeesten enz. Meer dan 600 referenties.

Vraag gratis uitgebreide geïllustreerde kataloog aan:

KATH. SMALFILM STUDIO, 32, OUDE BEURS, ANTWERPEN

La plej rekomendindaj originalaj

verkoj en Esperanto

estas la verkoj de la plej populara esperantisto-verkisto:

JULIO BAGHY.

Ĉu por distro, ĉu por studo, ĉu por ekzameno, tutegale, liajn verkojn vi legu!

Jen la titoloj kaj prezoj:

	Bind.	Broŝ.
Preter la Vivo ...	Fr. 24.—	Fr. 17.—
Sur sanga tero ...	Fr. 58.—	Fr. 45.—
Verdaj donkijotoj	Fr. 34.—	Fr. 24.—
La vagabondo kan-		
tas .....	Fr. 26.—	Fr. 16.—
La Verda Ĵoro ...	Fr. 36.—	Fr. 16.50
Printempo en la		
aŭtuno .....	Fr. —.—	Fr. 12.—
Teatra Korbo .....	Fr. —.—	Fr. 13.—
Aliaj tre rekomendindaj libroj estas:		
Leerboek voor Esperanto, de		
D-ro F. Szilagyi .....	Fr. 11.—	
Ellernu, daŭriga kurso, de		
D-ro F. Szilagyi .....	Fr. 16.—	
Plena Gramatiko de Espe-		
ranto, de K. Kalocsay ...	Fr. 84.—	
Haveblaj ĉe nia Vendinstituto, D. Mor-		
telmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk.		
Poŝtĉekkonto No 1194.82.		

Steunt onze Aankondigers.

Zij steunen ons,

en hebben goede waar.

Senpage!

vi ricevos senpage je la valoro de 15 fr. bonajn poŝtmarkojn de 15 diversaj landoj (laŭ la plej lasta katalogo de Yvert) se vi abonas la

REVUO INTERNACIA

de poŝtmarkinterŝanĝo kaj Turismo



Ĝi aperas 8-foje ĉiujare, 20 - 30-paĝa, riĉe ilustrita, kaj donas regule kaj artajn suplementojn kaj pm-donacojn, kaj kronikon kompletan de la novaj eldonaĵoj, kaj la liston de la membroj.

CIU ABONANTO RAJTAS 5 INTERSANGANONCOJN SENPAG-AJN.

Abonprezo: 15 frankaj belgaj,

pagotaj per poŝtmandato aŭ banko al

JOS. PHILIPPEN,

Botermarkt 10

DIEST

VOOR UWE

Parketvloeren, Linoleums, Meubelen en Marmers VRAAGT DE ALOMGEKENDE BOENWAS GLIMO

Firma Corstiaens - Neefs

St-Antoniussstraat, 12-14, Antwerpen

PLENA VORTARO de Esperanto

Verkita de: PROF. E. GROSJEAN-MAUPIN, direktoro de la sekcio « Komuna Vortaro » ĉe la Esp-ista Akademio; A. ESSELIN; S. GRENKAMP-KORNFELD; PROF. G. WARINGHIEN; membroj de la Esp-ista Lingvo Komitato.

Dua eldono 512 paĝoj Formato: 15 x 20 1/2 cm. En verda tola bindo kun ora surpriso.

Ĉi-tiu vortaro estas verkata tute en Esperanto. En ĝi la vortoj ne estas tradukitaj, sed en la lingvo Esperanto mem klarigitaj. Multaj ekzemploj, ĉerpitaj el la verkaro de Zamenhof kaj el verkoj de aliaj eminentaj verkistoj, montras la gustan kaj modelan uzadon de la vortoj. Ĉe la prepozicioj, prefiksoj, sufiksoj k.t.p. estas aldonitaj detalaj gramatikaj klarigoj pri ilia uzado.

Prezo 70 fr. Vendoinstituto de F.U.K.E. Eg. Segerslaan 14, Wilrijk.



SIGAREN FABRIKEN ROMANO N.V. GHEEL (Antw.)

ALLEEN FIJNE KWALITEIT SIGAREN, IN ALLE PRIJZEN GROOTE KEUS. — HAVANA SIGAREN.

Prij斯卡arten en stalen van sigaren op aanvraag.

FUKE-leden uit het Antwerpsche !

Voor uw

**Heeren- & Kinderkleding**

GEMAAKT EN MAAR MAAT

is het beste adres :

**J. PAESMANS**

**IN 'T DUIFKEN**

Koepoortstraat 64, Antwerpen. · Tel. 217.51

5 % AAN ONZE LEDEN !!

LIKEURSTOKERIJ

**DE RAAF**

■ ALLE SPECIALITEITEN ■

ALLE GEKENDE WIJNEN

**J. VANDEUN-JESPERS**

TURNHOUTSCHE BAAN, 277

BORGERHOUT (ANTW.)

FLANDRAJ  
ESPERANTISTOJ



EN ROESELARE  
ESTAS LA DE VI  
PREFERATA

**PRESEJO**

**H. & H. BRAEKEVELT**

Statedreef, 177 - Tel. 1080

Iedere groep, vereeniging of zaken-  
man gebruike vóór elk order onzen  
dienst voor inlichtingen en schetsen.

**Specialiteit :**

**ESPERANTO - DRUKWERK**

## Goedkoope en gezonde Wereld literatuur

Een reeks van 8 prachtboeken  
300 bladz., voor 80 fr. slechts !

Reeks 1935: werken van Lagerlöf, Kipling, Undset, enz.

Reeks 1936: .. .. Heidenstamm, Järnefelt, enz.

Reeks 1937: .. .. Lie, Muls, Gijsen, Gogol, enz.

**REEKS 1938 : 80 FR. VOOR 8 BOEKEN.**

- |                                |                        |
|--------------------------------|------------------------|
| 1. Twaalf Stoelen              | E. Katejew en Ilja Ilf |
| 2. De Doode Waterval           | Per Hallström          |
| 3. Valerius de Saedeleer       | A. De Ridder           |
| 4. Gazsi Hazenpeper            | Jeno Terzansky         |
| 5. Het Huis in 't Heilig Bloed | M. Moretti             |
| 6. De Verzegelde Engel         | Lesskow                |
| 7. Droogte                     | Van den Heever         |
| 8. Een Spook op Zolder         | M. Mathys              |

**REEKS 1934 : NOG BESCHIKBAAR AAN 6 FR.**

- |                                |                  |
|--------------------------------|------------------|
| 1. Rietvelde                   | Dr Van Driessche |
| 2. Ommeegang                   | Lode Baekelmans  |
| 3. De Kroniek van 't Grieshuus | Storm Theodoor   |


*PRIJZEN GELDEN VOOR BINNENLAND*

Vraagt uitgebreide prospectus en bestel bij

**L. CALLOENS.** Erembodegemstr. 29, Aalst

## Imperial

Schrijfmachines zijn de beste



Bureelmodel & draagbaar model  
ROESTVRIJ

Het meest MODERNE Schrijfmachines  
2 JAAR WAARBORG

Eerste klas schrijflinten voor alle merken van  
schrijfmachines & rekenmachines. - Ellam's  
carbonpapier - Ellam's duplicatoren,  
stencils en inkten.

Bijzonder werkhuis voor herstellingen aan alle  
schrijf- en rekenmachines.

**TOBIE DE PRINS** Tel. 216.20

● 32, Kathelijnevest, ANTWERPEN ●